


KOSMOS

ESPERANTO • LA KOSMOLOGIO DE MARTINUS • 1-2008

Donackulturo





Komento

de Helen Claesson

Karaj legantoj!

Jam printempas en Skandinavio kaj multaj homoj verŝajne plezure antaŭĝojas la varmon kaj la riĉecon de la somero en formo de floroj, mirindaj odoroj kaj belaj pejzaĝoj. Jes, la naturo donas al ni abundon de agrablaj donacoj. Ĉi tiun fojon ni tial volas trakti la temon "donacoj" pere de la artikolo "Donackulturo" de Martinus.

Mi pensas ke la plej multaj homoj ĉie en la mondo ŝatas ĝojigi siajn geamikojn kaj familianojn pere de donacoj, sed certe en nia interno ankaŭ troviĝas almenaŭ eteta sento de bezono ricevi ion reen de tiuj personoj al kiuj ni ion donis. Senkonscie oni atendas ian formon de "repago", sed ju pli multe oni atendas repagon des pli koletra aŭ malkontenta oni sin sentas, se oni ne ricevas ion reen de tiuj personoj al kiuj ni ion donis. Martinus vere bone kaj detale priskribas la problemojn ĉirkaŭ "donacoj"

en ĉi tiu artikolo, kaj li interalie diras: "La plej senerara rekonilo de la evoluo ne montriĝas en formo de persona havaĵo, sed kontraŭe en formo de tio, kiom da ĝojo oni kapablas senti atribuante al sia proksimulo iom de tio, kion oni posedas" (Citaĵo de Martinus el "Donackulturo").

En Klint ni provas krei tian etoson de la nova mondkulturo kaj ni ĉiuj ricevas bonegan ŝancon trejni donacemon, varmon kaj amon renkontante homojn el diversaj kulturoj kaj landoj. Mi ankaŭ volas informi al vi, ke ĉisomere eblas partopreni studgrupon en la kosmologio de Martinus pere de Esperanto, kiun Ole Therkelsen gvidos. Li ankaŭ ofertas al vi vesperprelegojn en Esperanto. Turnu vin al la Instituto de Martinus se vi deziras partopreni. Bonvenon!

Nun mi volas deziri al vi agrablan tempon kaj bonan legadon!

H.C





Donackulturo

de Martinus

Ĉapitro 1

Kiam donaco estas kamuflita antaŭpago atendita atingo

Unu el tiuj tradicioj, kiuj en la ĉiutaga vivo tre altgrade kreas elreviĝon, amarecon, melankolion kaj imagitan martirecon estas tiu, kiu estas konata sub la nocio "doni donacojn". Ĉi tie oni certe kun miro demandas, ĉu la afero doni donacojn ne estas io bona, io, pri kio oni precipe devas ekzerci sin. Kaj estas ja nerefuteble, ke la absolute nekuebla respondo al tio fariĝas, ke la donackapablo estas la ĉefa fundamento, sur kiu baziĝas ĉia absoluta feliĉo. Jes, ĝi estas eĉ tiel ĉiosignifa, ke la vojo posedi sian vivon iras ekskluzive tra la agado doni sian vivon, oferi ĝin por aliaj, kio signifas vivi en altruisma servado al aliaj. La samo estas esprimita per la Jesuaj vortoj: "*Ĉiu, kiu donas sian vivon por aliaj, posedos ĝin, sed tiu, kiu ne donas sian vivon, perdos ĝin*".

La vualado de ĉi tiu motivo por la donado de la donanto antaŭlonge por tiu estulo fariĝis tiel supereca kutimkonscio, ke en la plej multaj situacioj ĝi estas "C-scio", kio signifas, ke ĝi estas transirinta al aŭtomata funkcio kaj sekve okazas memstare sen la konscia kontrolo de la individuo. La sekvo de tio fariĝas, ke en tiaj okazoj kvankam li havas iujn por li mem agrablajn atendojn la individuo ne konscias pri ĉi tiu egoisma motivo kaj sekve en sia maldorma tagokonscio bonfide opinias doni pro tute altruismaj kaŭzoj. Ke la motivo de lia donado havu kunligon kun ĉi tiuj agrablaj atendoj estas tio, kion lia subkonscio faris kutimo por li ne kredi aŭ ne klare konscii, ĝuste ĉar en la koncerna okazo li inklinas kredi je sia propra nobleco. Tial la vera motivo de lia dono estos malkaŝita nur, kiam la atenditaj bonaĵoj forestas. Tiam li komencas senti sin flankenŝovita, miskomprenita, eĉ malĝuste traktita de tiu, kiu estis objekto de lia dono aŭ donaco. Li

sentas sin en speco de martireco, kiu en plej malbonaj okazoj povas esprimiĝi en amaro, eĉ persekuto de la donacricevinto, tute sen tio, ke tiu faris iun ajn veran malbonon al la donacinto. Kaj per tio montriĝas fakto, ke la indigno de la doninto ŝuldiĝas al nekontentigitaj esperoj, alivorte al foresto de la atenditaj bonaĵoj, kiuj estis la kaŝita motivo por la dono aŭ la donaco.

Ĉapitro 2

La nuna sociaranĝo kaj ĝia influo al la menso

Ĉi tiu metodo nur temas pri blufado al tiu, kies posedaĵon oni deziras proprigi al si kiel eble plej senrekompense. Tio ĉi alivorte signifas metodon, kiu laŭ precipa grado estas bazita sur la kapablo apliki mensogon. Pere de malvero "la fraŭdisto" klopodas kaŝi la faktajn realajn cirkonstancojn por tiu, kiun li deziras fraŭdi. Tiu ĉi kaŝado okazas kompreneble laŭ tia maniero, ke lia viktimo ricevas la percepton, ke plenumo de la deziro de la fraŭdisto laŭ la kondiĉoj prezentitaj de li estas grandega ekonomia aŭ laŭ alia maniero, favora gajno. Sed poste, kiam la fraŭdisto estas longe for kun sia akiraĵo, lia viktimo trovas, ke tute ne ekzistas la atenditaj avantaĝoj pro plenumo de la deziroj de la fraŭdisto, ili estas puraj mensogoj. Kaj li do staras pli riĉa je sperto, sed kutime pli malriĉa je posedaĵo.

Ĉapitro 3

Reklamo kiel maskita donacpropagando

La menciitaj aferoj kompreneble ne estu perceptataj kiel malica kritiko al iu certa

unuopa firmao, ĉar tia ja estus sensenca aŭ senameca. Kontraŭe oni perceptu tiun tutan problemon nur kiel demandon de evoluo. La aktualaj cirkonstancoj estas la fruktoj aŭ rekoniloj de certa evolunivelo kaj estas ĉi tie prezentitaj nur por montri, ke la aktuala sociaranĝo troviĝas ĝuste sur tiu nivelo, kies naturo do estas esprimiĝi tra la ĉi tie menciitaj cirkonstancoj kaj per tio estas kundecida pri la nuntempaj menso kaj sintenoj de la homoj al la plej nobla aŭ sankta principo de la vivo, la afero "doni".

Ĉapitro 4

La socisuferoj, diktaturo kaj donacprincipo

"Doni" sekve estas la malo de "devigi". La homaro estas savebla nur per "donado". La principo de la mondliberigado mem sekve konsistas ekskluzive el evoluigi la "donkapablon" en la tera homo. Kaj samgrade kiel por tio kreskas la talento de ĉi tiu estulo, samgrade ĝi atingas ondolongon kun la principo de la vivo mem, kiu ja en si mem estas unu sola granda donacdonado. Laŭ kosma vidpunkto ne kostas naskiĝi en la mondo. Morti ne kostas, kreski ne kostas, same kiel la vido, flaro, gusto, aŭdo kaj sento ne estas "aĉetitaj" aŭ "pagitaj" realaĵoj. La homo vadas en kosmaj riĉecoj. La mondo estas plena de ĉiuj tiuj valoroj, kio estas ĉiuj tiuj valoroj de varmo, nutro kaj distro, kiujn postulas la evoluo kaj vivigo de la homoj tra senmezuraj tempaj eraoj. Sed la homoj ankoraŭ ne komprenas kiel oni estas je ondolongo kun la principo de la vivo mem. Ĉu ne troviĝas sufiĉe da karbominejoj? – Kial do miloj da homoj devas frosti aŭ pli malpli mankas al ili aliro de tiu ĉi varmofonto? – Ĉu ne ekzistas sufiĉe da

elektro aŭ fortofontoj en la naturo? – Sed tamen miloj da homoj devas en la ŝvito de sia vizaĝo laboregi tiel, ke ili fariĝas kurbigitaj, kaj ostecaj. – Ĉu ne troviĝas sufiĉe da pangreno aŭ nutraĵoj? – Kaj tamen miloj da homoj devas morti pro malsato. – Ĉu la tero ne estas sufiĉe provizita per senmezuraj ampleksaj, belaj, bontemperaturaj, sunriĉaj kaj fekundaj regionoj? – Sed miloj kaj miloj da homoj devas "forbruliĝi" aŭ suferi en varmegaj dezertaj regionoj samtempe kun tio, ke aliaj miloj devas vivi frostan vivon en primitiveco en la vintra mallumo kaj glaciregionoj de la polusoj. – Ĉu ne troviĝas sufiĉe da materialoj por belaj vestoj kaj ekipaĵo por ĉiuj homoj? – Sed malgraŭ tio ĉi grandaj homamasoj portas ĉifonojn kaj vestaĉojn. – Kial ĉiuj ĉi malagrablaĵoj? – Ĉu ne ĝuste pro tio, ke ĉiuj menciitaj kosmaj donacoj, la grandaj stokejoj de vivovaloroj de la tero, nur ekzistas aŭ estas okupitaj kiel "privataj posedaĵoj"? – Kaj kial ili troviĝas en tia situacio? – Ĉu ne la kaŭzo estas, ke ankoraŭ la teraj homoj tiom ekzistas surbaze de la bestaj tradicioj, ankoraŭ troviĝas sur tiel malalta aŭ primitiva stadio en la evoluo, ke la donacprincipo estas nur sensignifa afero en ilia menso, dum la "komerca principo" aŭ "la principo de prenado" estas la ĉefa? – Tial evoluis ĉe la homoj granda talento por "preni", sed nur malgranda talento por "doni", kaj sekve ili estas antaŭdestinitaj por esti en malharmonio kun la principo de la vivo mem, kiu ja kiel antaŭe menciite estas kulminanta donacado. Tie, kie ne estas tiel, estas ekskluzive la vivaj estuloj mem, kiuj malhelpas tion. Farante ĉiodominan disvolvon de "la principo de prenado" vivkondiĉo, oni ne povas veni je ondolongo kun la baza destino de la eterna mondplano, kiu – senpage – "igas la sunon

brili sur malbonajn kaj bonajn kaj igas pluvon fali sur justajn kaj maljustajn". – Kaj ĉi tie oni pli bone komprenas, ke la vojo al la vivo aŭ la savo de la tera homaro koncentriĝas ekskluzive en la eterna frazo: "pli beate estas doni, ol ricevi". –

Ĉapitro 5

La kapablo doni kaj neriĉeco aŭ malriĉeco estas rekonilo de la evoluŝtupo de homo

Juĝi la veran evoluŝtupon de homoj laŭ ilia materia riĉeco aŭ malriĉeco sekve kontraŭas al ĉia absoluta logiko aŭ ĉia perfekta maniero de kalkulado aŭ rekonado. Ĉiu, kiu prenas nur ĉi tiujn du faktorojn kiel rekonilojn aŭ mezuron de evoluo, necese pli aŭ malpli poste malsukcesos. La plej senrara rekonilo de la evoluo ne montriĝas en formo de persona havaĵo, sed kontraŭe en formo de tio, kiom da ĝojo oni kapablas senti atribuante al sia proksimulo iom de tio, kion oni posedas. Nia rilato al la afero doni estas nia rilato al la evoluo. Laŭ tio vidiĝas, kie oni staras. Per tio vidiĝas kiom da distanco mankas al la tera homo por esti "preta" estulo, kio signifas tiun estulostaton, kiu en "Livets Bog" esprimiĝas kiel "la vera homo".

Ĉapitro 6

La savo de la mondo pere de la donacprincipo, la pereco de la diktaturo kaj la estiĝo de la demokratio

Sed la anima vivo kreskas. Ĉar la rezulto de la evoluo estas kreskanta libereco, kaj la diktaturo estas devigo, neeviteble venos

tempo, kiam ĉia diktaturo estos ĉesinta avantaĝe al demokratio, kiu per sia ŝanĝebla aŭ movebla strukturo povas sekvi la evoluon kaj daŭre per sia liberiga naturo povas esti sur nivelo kun la kreskantaj mensaj postuloj aŭ baroj, ĉu sur la arta, ĉu sur la scienca kiel ankaŭ sur la pure ekonomia kampo. Tiel la diktaturo estas la estinteco. La demokratio estas la estonteco. Ĉar la demokratio donas liberecon al siaj civitanoj ŝanĝiĝi laŭ la evoluo per tio, ke ilia voĉa plimulto kreskas antaŭen por avidi ĉi tiun ŝanĝon, kaj ĉar ĉi tiu libereco kutime devas atenti aŭ esti iom reduktita de la voĉa malplimulto aŭ opozicio de la civitanoj, per kio estiĝas certa garantio, ke troa rapideco ne povas okazi kaj sekve ĝisfunda pripensado ne estas evitebla, tial la demokratio en la realo fariĝas iu samnivele kun la evoluo ekzistanta kulturado de la liberecdonacado de la vivo mem al la kreskanta terhoma menso. Tiel la demokratio estas la sola rimedo, per kiu la donado de la kresko de la vivo aŭ la kreoŝanĝiĝo de la amaso de besto al homo, fare de la kosma donacprincipo, povas malkaŝiĝi aŭ praktikiĝi laŭ la malplej sanga maniero. La vera demokratio sekve estas iu en libereco kreskanta kreaĵo kiu kaŭzas malfermiĝon en la tera mensa sfero, tra kiu laŭ adaptita maniero la amaso finfine senbare povas ricevi aliron al la plej granda donaco de la vivo: la plej granda aŭ nelimigita en spirito kaj kulturo, en saĝo kaj amo kaj la kun tio neskueble ligita kreado de ĉion superbrila paco kaj harmonio kiel fakto en la ĉiutaga vivo sur la tero.

Ĉapitro 7

La donacprincipo kaj la ciklo de la naturo. La demokratio kaj la mondliberigado

"Doni" tio do estas la devizo de la vivo. Sed kiam la afero "doni" povas havi tiajn sekvojn kiel la menciitajn, kiel tia manifestaĵo do povas esti tiel necesa aŭ bezonata? – Ĉi tie oni devas unue kompreni, kion reale signifas "doni" aŭ kio "donaco" vere estas. En la ĉiutaga vivo certe ne troviĝas io, kio estas pli misuzita ol la esprimo "donacoj". Nome estas tiel, ke tio, kion en la ĉiutaga vivo oni nomas "donacoj" aŭ "doni" en la realo tute ne estas "donacoj" aŭ prave povas aparteni al la principo "doni", sed kontraŭe estas nur kamuflo por aĉeto kaj vendo de kontentigo de egoismaj avidoj. Ĉi tiu kamuflo povas esti eĉ tiel efika kaj laŭkutime aranĝita de la subkonscio de ĝia propra origino, ke tiu kelkfoje tute ne tagokonscie sentetas la realan analizon de la situacio, kiam ĝi dum iu aŭ alia okazo donas ion al iu aŭ alia kaj sekve unuinstance bonfide opinias sin en la situacio doni. Plue tio signifas, ke por la maldorma tagokonscio de la donanto la menciita situacio aperas kiel donado de donaco, dum en la realo la aferoj estas, ke en la koncerne okazo "la donaco" estas nur rimedo, pere de kiu la donanto klopodas atingi kontentiĝon de iu aŭ alia egoisma avido, mallonge dirite, ke en la realo "la donaco" estas speco de "antaŭpago" por iu aŭ alia atendita atingado de iu aŭ alia dezirata venonta bonaĵo.

Por vere povi kompreni la menciitajn aferojn oni devas kompreni, ke la tera homaro ankoraŭ staras sur tiel malalta evoluŝtupo, ke grandskale estas vivkondiĉo por ĝiaj unuopaj individuoj esti – egoism-

aj. Ankoraŭ la ekzistantaj aŭtoritatoj kun ilia leĝo- kaj rajtosistemo ne atingis antaŭen al tia pozicio rilate al la reganta egoisma aŭ besta avidego en la batalo de la individuoj pri la valoroj kaj la kun ili ligitaj materiaj bonaĵoj, ke ili povis krei Temp-on, trankvilon kaj sekurecon por la unuopaj individuoj evolui en altruismo. Hodiaŭ la sinkonserva instinkto elvokas en la unuopaj individuoj daŭran ĉiodominan timon pro malriĉeco kaj la kun ĝi ligitan subiĝon kaj sklavecon, ĉar ankoraŭ la sociarangō ne atingis antaŭen al tia kultura nivelo, ke ĝi povis aboli la sklavecon, sed montras kiel fakton, ke tiuj, kiuj ne havas valorojn, tiuj, kiuj nenion posedas, devas sklavi por tiuj, kiuj posedas ĉi tiujn valorojn, estas aĉetataj kaj pagataj de tiuj, kiuj havas ion per kio aĉeti. Nuntempe la valoro en la mondo en la realo estas nur afero, pere de kiu oni povas aĉeti siajn kunestulojn, devigi ilin esti kunlaborantoj en agado por havigi al si ankoraŭ pli da valoroj kaj ĉi tiel proprigi al si specon de sendependeco aŭ libereco, specon de gardado kontraŭ la sklaveco embuskanta malantaŭ ĉiuj aferoj.

La ekzistanta sociarango aŭ la valor-aĵadministrado de hodiaŭ do kreskigas en ĉiu homo treege grandan intereson kaj simpatian pri proprigo de la valoroj, eĉ en tiel ĉiodomina forto, ke inter tiuj estuloj, kiuj ankoraŭ ne laciĝis en la batalo por la estado kaj en la apatio de la senespereco profundigis en vagado, trompado kaj Mensmalsano, preskaŭ neniu havas tempon aŭ kuraĝas pensi pri io alia ol la daŭra gardado de sia ekonomio. Per fera mano la socio devigas siajn individuojn vidi "la riĉulon" kiel unu el la plej grandaj pristreb-indaj idealoj. Kaj tial ĉiuj, kiuj vivas en la brilo de riĉeco fariĝas admirataj aŭ kultataj. Ĉu ne estas precize tiel, ke la personaro

de iu komercejo tute alie servegas al la riĉa kliento, la heredonto de milionoj, kiu eble eĉ ne estas kutimigita fari utilan laboron zorgi pri si mem, vesti sin kaj devesti sin, ol por la maljuna malriĉa viro kurbigita kaj ostecigita de la laborego kaj penego? – Kion aŭ kiun oni kultas tie? – Se estus la laboro, oni ja devus porti la eluzintan kaj ostecan malriĉan maljunan viron en ora seĝo. Sed ĉu oni faras tion? – Ĉu li ne pli estas iomete malestimata kompare kun la milionheredonto? – Sed ĉu do estas la homo mem malantaŭ la milionoj por kiu oni havas tiun treege grandan simpatian? – Ne absolute ne. Kia oni imagas la situacion, se subite la sama homo perdus sian kapitalhavaĵon kaj malriĉa kaj ĉifona envenus en la saman komercejon por aĉetion aŭ alion je kredito? – Ĉu oni kredas, ke en tia okazo la personaro aŭ la posedantoj de la komercejo stumblus unu je alia en troigita urĝeco por povi plenumi la plej etajn dezirojn de tiu persono? – Ne estas la persono aŭ la homo, sed la milionoj, kiujn oni salutegas. Kien iras la oro, tien sekvas la kultado. La mondo plej facile ekvidas personon en la lumo de ĝiaj grandaj posedaĵoj en la lumo de la brilaĵo de ĝia oro. Estas tiu brilaĵo, kiu plej facile donas aliron al favorado kaj ovacio fare de la mondo. La timego fariĝi ekonomie subpremita, la timego ruiniĝi en sklaveco, malriĉeco kaj nevivsubteneco sekve igas la kultadon de la oro, kio alivorte estas evoluo de la kapablo proprigi al si kapitalon aŭ kapitalhavaĵon, la unua kondiĉo de la sinkonserva instinkto. Ĉio, kio povas doni kapitalon aŭ bonstaton, sekve estas ĉefaj faktoroj en la ĉiutaga vivo. Ĉar hodiaŭ ĉiuj valoroj jam estas okupitaj, ekzistas kiel privata posedaĵo de aliaj homoj, tiuj faktoroj sekve temas pri tio, kiamaniere oni plej efike

povas ekposedi ĉi tiujn valorojn, kiujn do "posedas" aliaj. La plej primitivaj faktoroj estas simpla rabo, kio signifas, ke per kruda kaj brutala forto oni proprigas al si la posedaĵojn de sia proksimulo. Ĉi tiu formo de proprigo de valoroj estas grand-skale dominanta ĉe primitivaj aŭ sovaĝaj popoltriboj, sed troviĝas ankaŭ en iu klaso de homoj en la kadro de tiel nomata "civilizo". Ĉi tie oni malpermesas tiun primitivan formon de proprigo de la posedaĵoj de la proksimulo, kaj tial tiu klaso de homoj, kiuj en la realo estas nur "naturhomoj", fariĝas "leĝorompantoj" kaj elvokas persekuton kaj punon de la civilizo. Tiun klason de homoj ni nomas krimuloj. Tio tamen ne validas, kiam la rabado okazas sub la nomo milito, kio plue signifas, kiam la rabado okazas surbaze de la deziro aŭ decido de tuta popolo proprigi al si posedaĵojn de alia popolo. Ĉi tie tio estas ankoraŭ "heroa faro", kiun oni benas kaj honorigas per kanonsalutado, paradoj kaj ordenoj. Ĉi tie oni eble opinias, ke tio tamen estas prava kaj natura, kiam temas pri defenda milito. Sed kie troviĝas tia en la nuna tempo? – Ĉu oni kredas eble, ke iu nuntempa aŭ venonta militanta potenco ne imagas "defendan" militon, senkonsidere kiel evidente ataka estas ĉi tiu milito? – Ĉu ne estas unu el la fruktoj de la nuntempa civilizo, ke ĉiuj batalas sub la nomo defendo? – Kaj kio estas do tio, kio estas defendata? – Ĉu ne estas ĝenerale valida afero, ke la posedaĵoj kaj landlimoj de ĉiu popolo estas realaĵoj, kiujn la sama popolo aŭ ĝiaj pragepatroj proprigis per atako kaj rabo? – Ĉu eblas kontesti, ke ili estas "rabitaj posedaĵoj"? – Ke oni "posedis" ilin dum longaj periodoj eble tute de la pra-tempo, tio ja ne ŝanĝas la principon. Kaj milito, kio estas defendo de "rabitaj posed-

aĵoj", ĉu ne estas same prave nomi ĝin "ataka" milito, kiel estas prave en la dudeka jarcento nomi modernan atakan militon "defenda" milito? – Kaj kio estas do "ataka" milito, kaj kio estas "defenda" milito? – Ĉu ne estas tiel, ke la nomo "defenda" estas karakterizo, per kiu la homoj kamuflas la veron de ĉiu milito? – Laŭ kosma vidpunkto absolute senescepte ĉiuj militoj estas identigeblaj kiel "atakaj" militoj, ĉar neniu ajn landa regiono en la mondo kun ĝiaj vivbezonaĵoj kaj valoroj de krudmaterialoj estas donita kiel absolute privata posedo al iu aŭ alia popolo, al iu aŭ alia ŝtato. Ke tamen hodiaŭ ĉiuj landregionoj de la mondo estas dividitaj en "privatposedaĵoj" inter la popoloj, tio ja ŝuldiĝas ekskluzive al la principo de atako, alivorte "la principo de rabo", al la kruda kaj brutala proprigo per supera aplikado de potenco.

Ĉi tiu formo de proprigo de valoroj estas do nur tolerata inter la nacioj, kiam ankoraŭ ne troviĝas realisma internacia aŭ komuna rajtosistemo. Reciproke inter la individuoj de la socioj oni antaŭ longe forigis ĉi tiun primitivan formon de proprigo kaj faris ĝin punenda. Sed ĉar oni faris rabon punenda kaj samtempe grand-skale per erara sociadministrado faras avidon al la havaĵo de sia proksimulo sinkonserva instinkto aŭ deviga neceso por la unuopaj homoj, tial tiuj avidoj rezultigis novan metodon, per kiu oni povas ekposedi iom de ĉi tiu havaĵo ne uzante la fatalan kaj punendan potencon. Ĉi tiu metodo estas konata sub la nocio "ŝtelo". Kaj kiel konate ĉi tiu metodo estas "sekreta" proprigo de valoroj apartenantaj al la proksimulo. Per tio sekrete proprigante al si tiujn ĉi valorojn kaj per daŭra evito ke tiu sia ago malkaŝiĝu, oni tiel povas eviti la por la sama ago

ekzistantan punon kaj laŭleĝan rekompenson por la proprigitaj valoroj.

Ŝtelo sekve estas metodo, laŭ kiu en plej bonŝancoj okazoj oni povas kun malpli da risko ol ĉe la danĝera rabometodo proprigi al si valorojn apartenantajn al sia proksimulo. Sed ĉar ankaŭ ŝtelo estas punenda, kaj samtempe plej multaj homoj protektas siajn posedaĵojn malantaŭ bariloj kaj seruroj, malantaŭ gardohundoj kaj gardofunkciuloj tial la prainstinktoj malantaŭ la sinkonserva instinkto trovis realiĝon tra metodoj ankoraŭ pli rafinitaj ol rabo kaj ŝtelo por senrekompense proprigi al si havaĵon kaj oron. Kiel la du jam priskribitaj la plej simpla el tiuj metodoj estas punenda kaj estas konata sub la nomo "fraŭdo".

La menciitajn krudajn kaj simplajn prametodojn aŭ bestajn formojn de propraigo de valoroj la evoluo de la civilizo faris punendaj kiel jam menciite, kaj sekve la aplikado de tiuj ĉi metodoj faras sian praktikanton leĝorompanto aŭ krimulo. Sed la civilizo ne estis kapabla samgrade perfektigi la disdividon aŭ administradon de la materiaj valoroj. Daŭre nia ĉiutaga pano ekzistas kiel "privata posedaĵo" de nia proksimulo. Sekve de tio la sama civilizo bezonas toleri metodon de vardivido, kiun ni nomas "komerco". Laŭ sia kosma analizo tiu ĉi metodo esprimiĝas en la principo "sama valoro por sama valoro", kaj sekve estas logika aŭ plene honesta laŭ sia vera naturo. Sed ankoraŭ la civilizo ne kapablas konservi ĝin sur tiel altigita nivelo. Sekve ĉia komercado kutime ne okazas sub la principo "egalaj valoroj por egalaj valoroj", sed kontraŭe sub la principo "malpli da valoro por pli da valoro". Ĉi tio alivorte signifas, ke varo devas esti pagata ne nur per ĝia reala valoro, sed per kelkaj procentoj da kroma valoro. Kiel ni vidos en la

sekvanta teksto la demando, kiom da procentoj da kromaj valoroj estu donataj por varo respondas precize al la plej alta prezo je kiu, sub la troviĝantaj cirkonstancoj, la vendanto povas devigi la aĉetanton pagi.

En sia ŝanĝado de la mondaj valoroj de privata posedaĵo al tutpopola posedaĵo por la monda loĝantaro sendepende de nacioj kaj ŝtatoj la civilizo troviĝas nur en sia delikata komenciĝo (vidu kvaran ĉapitron de "Livets Bog"), kaj la ekzisteblo de ĉiu senkapitala homo ekzistas fakte nur kiel la privata posedaĵo de la kapitalhavaj homoj sekve de kio ĝi estas komercaĵo kaj necese aĉetenda de tiuj, kaj tial estas memkomprenebla afero, ke senhaveco ne estas populara, kaj ke la timego pro malriĉeco aŭ mizero troviĝas kvazaŭ en la sango de la plej multaj. Tiel ĉiu, kiu havas valorojn, vidas grandan riskon en perdo de ili kaj ne volonte rezignas je ili, sed en plej multaj okazoj prefere uzas ilin por proprigi al si ankoraŭ pli da valoroj.

Sed kiam tiu, de kiu la senkapitala aŭ senrimeda homo necese estas devigita aĉeti sian ekzistadon, havas tian sintenon rilate al tiu ĉi vendo, do estas memkomprenebla afero, ke ĉi tio grandskale fariĝas kontrasto al tio, por kio en la realo ĝi estas destinita laŭ ĝia kosma analizo: "egalaj valoroj por egalaj valoroj". Estas certa afero, ke la aĉetanto pagos multe, kiam la vendanto estas interesita vendi nur je prezo kiel eble plej alta, tute sendepende de la vera aŭ reala valoro de la varo.

Sed postuli pagon por malpli da valoroj per pli grandaj valoroj estas ja "fraŭdo". Ĉar la civilizo ankaŭ kontraŭas ĉi tion per sia leĝo- kaj rajtosistemo, tial tia komerco ja povas okazi nur, kie ĝi estas kamuflita laŭ tia maniero, ke ĝi ŝajnas esti en ordo, kio do signifas plenumas la principon

"egalaj valoroj por egalaj valoroj". La sekvo de tio ĉi plue fariĝis, ke en la komerca mondo oni grandskale evoluigis sin ĝis genieco rilate al la kapablo akceli aŭ praktiki ĉi tiun kamuflaĵon protektantan la fraŭdoprincipon.

Grandan helpon pri tio la komerca mondo havas en tiu afero, kiun ni nomas reklamo. Laŭ kosma vidpunkto ĝi devus esti nur honesta informo pri la ekzisto de la varo, per ĝia reala kaj vera valoro, kio signifas pri la kosto de ĝia produktado, alivorte malkaŝa kaj vera deklaro pri materiala valoro kaj labora salajro. Sed ĉu la moderna reklamo estas tia? – Ĉu ne estas tiel, ke la menciita informo estas "sekreto de komerco"? – Kaj ĉu tiu menciita reklamo ne fariĝis rimedo, per kiu oni plej altgrade klopodas kaŝi la menciitan informon? – Ĉu ĝi ne fariĝis rimedo, per kiu oni plej laŭeble klopodas sugestii la klienton kredi je tiom kaj tiom da avantaĝoj aĉetumante ĉe la reklamanto? – Ĉu ne troviĝas grandaj firmaoj, kiuj pagas milionojn da kronoj por praktiki tian propagandon aŭ sugestian arton? – Ĉu ne per lukse faritaj katalogoj kaj tut- aŭ duonpaĝaj multekostaj anoncoj en la plej grandaj tag- kaj semajnjournaloj, ili klopodas rakonti kiom senfine "malmultekoste", oni povas aĉetumi ĉe ili? – Sed laŭ kosma vidpunkto aĉeti "malmultekoste" estas ja la samo kiel pagi malpli da valoro por pli da valoro, kio signifas, ke en tia okazo oni ricevas ion donace. Tiel la reklamomilionoj daŭrigas propagandon aŭ informon al la klientoj pri tio, ke komercante kun la koncernaj firmaoj oni ricevas tiom aŭ tiom "donace". Sed de kie venas la reklamaj milionoj? – Kiel firmao povas ekzisti sur tiu bazo, ke la klientoj devas pagi "malpli da valoroj por pli da valoroj"? – Tio ja nepre devas kaŭzi grandigantan de-

ficiton kun fina neevitebla ruiniĝo. Sed ĉu la ĝenerala fakto ne estas la malo de tio? – Ĉu oni ne vidas multajn grandmagazenojn kun multekostaj reklamoj kreski en bonstato kaj lukso, doni pli aŭ malpli da gajno al akciuloj aŭ posedantoj? – De kie venas ĉi tiuj valoroj? – De la klientoj ili ja ne povas veni, ĉar kiel jam montrite laŭ la multekosta propagando de la koncernaj firmaoj ili mem vendas nur kun perdo. El kiu sekreta fonto de riĉeco tiuj firmaoj do povas tiel donaceme ĉerpi, ke ĝis certa grado ili estas konsiderendaj preskaŭ kiel filantropaj? –

Ĉu ne estas io erara en ĉi tiu supozo? – Ĉu ne tiu sekreta fonto de riĉeco estas – la klientoj? – Ĉu ne la anoncita "subprezo" estas kaŝo, kiu kovras tiun cirkonstancon, ke en la realo la kliento pagas superprezon? – Alivorte ĉi tio signifas, ke la firmao tute ne liveras "pli da valoroj kontraŭ malpli da valoroj" kiel pagon, sed kontraŭe estas la kliento, kiu pagas "pli da valoroj por malpli da valoroj". Sekve la kliento pagas ne nur la ricevitan varon per ĝia reala prezo, sed li ankaŭ kontribuas al la firmao per mono, kiu i. a. faras ĉi tiun kapabla fari tiun reklamon, pere de kiu li mem sugestiĝas aŭ ricevas la imagon, ke li faris bonan aĉeton, ricevis sian varon "malmultekoste", ricevis ion "donace". Kaj kun tiu ĉi kredo li estas ĝoja kaj fariĝas inspirita al nova komerco kun la "avantaĝaj" firmaoj. Kaj tiel oni pli bone komprenas, kial la firmaoj havas siajn "sekretojn de komerco".

Kiel montris la antaŭa teksto la ekzistanta sociaranĝo ankoraŭ ekzistas sur tia primitiva evolunivelo, ke ĝi faras la proprigon de valoroj, la avidon pri la kapitalo aŭ riĉeco, preskaŭ ĉiosupera vivkondiĉo por ĉiu unuopa homo. Ĝi nome ne povas malhelpi, ke hodiaŭ ĉiujn valorojn de la

mondo posedas certa parto de la homaro de la tero, dum la cetera parto de la sama homaro nenion posedas. Kaj sekve fariĝas ekonomia lumflanko kaj responda ombroflanko. Ĉar ĉi tiu ombra flanko signifas malriĉon, sklavecon, mankojn kaj malsaton, ĉifonojn, nevivsubtenecon kaj humiliĝon, la vojo al la ekonomia lumflanko en la vivo fariĝis la fokusa punkto en la nuntempa mensostato de la tera homo. La ĉiutaga estado estas permanenta milito inter la reprezentantoj de tiuj ĉi du menciitaj flankoj de la vivo. Ĉiuj batalas kontraŭ ĉiuj. La senrimedaj batalas por elveni el la malriĉeco kaj la sklaveco. La riĉaj batalas por konservi siajn riĉaĵojn, kaj sekve esti garditaj kontraŭ malriĉo kaj sklaveco.

Tio, ke tiaj estas la cirkonstancoj, estas la kaŭzo de la plej granda parto de la tuta terhoma sufero. Tio estas la fonto de milito. Tio estas la fonto de krimoj. Tio estas la fonto de subpremo kaj humiliĝo. Tio estas la fonto de tiu mizero, "ploro kaj grincado de dentoj", kiuj igas la homojn kribi al la ĉielo kaj tiel igas mondliberigadon aktuala.

Ŝanĝi la vivovalorojn de la mondo de esti "komerca varo" al esti "donaco por ĉiuj homoj", tio estas "la savo" de la mondo. Ŝanĝi ĉe la homoj ilian avidon fari ĉion privata posedo al la avido fari ĉion komuna posedaĵo, tio estas konduki la homaron el la bestaj tradicioj, tio estas liberigi ĝin de la vera paganeco kaj sekve enigi ĝin en tiun regnon, kiu origine "ne estis el tiu ĉi mondo". Tio estas forigi la ĉefan kaŭzon de la tiel nomata "malbono". Kaj kun ĉi tiu forigo, ĉia bazo de envio, rabo, ŝtelo, fraŭdo, malriĉo, sklaveco kaj humiliĝo sekve estas forigita.

Sed tiel ŝanĝi la mondon ne estas farebla pere de ordono de potenco. Semio ja

ne fariĝas homo per komando de diktatoro. Kaj la tera homaro ne povas transsalti la evoluon de jarcentoj pro diktaturo. La evoluo estas realigebla ekskluzive nur per informado. Sed informado ekzistas nur surbaze de memtravivado.

Estas ĝuste, ke io nomiĝas "instruado", sed senkonsidere sub kiu ajn formo ĝi aperas, ĝi estas nur kulturado de aŭ lertigo pri memtravivado. Ĉio, kio ne estas memtravivata, estas nur supozoj. Nur la reala memtravivado povas fari "supozon" "fakto".

Ĉio, kio ekzistas sub la nocio diktaturo sekve ne povas rekte levi la homojn unu solan parteton for de ilia nuna evoluŝtupo. Tiu "kulturo", kiu ĉi tie estas havigita al la teraj homoj, estas nur ordonita deviga vivmaniero, kiu estas reprezentaĵo de tiuj karakterizaĵoj, kiuj konsistigas tiun evoluŝtupon, sur kiu troviĝas la diktatoro. Por tiuj individuoj, kiuj troviĝas en la fokuso de la evoluŝtupo de la diktatoro, ĉi tiuj apartaĵoj kompreneble sentiĝas kiel la plej alte imagebla idealismo, kaj la diktatoro kiel ilia gardanĝelo, ĉar precize iliajn naturajn, avidojn kaj imagojn pri la vivo lia materia potenco konservas devige. Sed por tiuj homoj, kiuj antaŭ longe fintravivis ĉi tiujn apartaĵojn, ekzemple sur la milita, geedzeca kaj raseca, religieca aŭ pure kultura kampoj, kaj sekve troviĝas sur alia pli alta kaj por la diktatoro tute ne komprenebla evoluŝtupo, la diktaturo aŭ la ordonita deviga vivmaniero fariĝas malhelpa "frenzuljako" kiu sub la pli altaj kaj pli fortaj internaj mensaj grandeco, indeco kaj kresko de tiuj homoj pli aŭ malpli devas krevi aŭ eksplodi. Ĉar per tio ili kolizias kun la leĝoj de la diktatoro, estas danĝero por lia potenco, oni bone komprenas, kial la diktaturo devas havi precipe multajn

koncentrejojn, malliberejojn kaj eksekutejojn. Necesas maldanĝerigi "la danĝerajn", "kontraŭ popolajn" kio signifas la homojn malamikajn al la diktaturo. Kaj tiel ne "sciante, kion oni faras", oni atakas la evoluon, faras fetomortigon de pli alta kulturo, kaj en grandioza militista brilaĵo oni marŝas, daŭre blinde, rapide antaŭen al sia propra eksekuto. Ĉar ataki la evoluon, mortigi pli altan kulturon, tio estas kontraŭi la eternan strukturon de la mondotuto, tio estas kritiki Dion. Kaj rilate al tia superpotenco ĉiuj finfine devas cedi. Ĉi tie validas "ĉiu, kiu glavon prenas, per glavo pereos". –

Ankaŭ por homoj, kiuj en la evoluo multe malsuperas al la diktatoro, la diktatoro ne estas savo. Devigi primitivajn naturhomojn subite manifesti pli altan evoluŝtupon ol tiun, al kiu laŭ la naturo ili atingis, tio ne signifas doni al tiuj estuloj animan nobligon. Tiel facile ne estas levi estulojn de unu evoluŝtupo al alia. La sekvo ankaŭ estas, ke la menciita surdevigita konduto fariĝas identa nur kun "kulturo" kaj "edukiteco", kiu respondas al tiu, kiun la bestodresisto uzas al siaj sovaĝoj bestoj, nome ĝenan kaj malagrablan kaj sekve por tiuj estuloj malamatan dresadon. Kaj do ankaŭ fariĝas ia "cirka prezentaĵo", kiam naturhomoj montras "estimon" kaj "obemon" al diktaturo, kiu per supera moderna militotekniko kaj kruda punsistemo subpremas ĉian formon de kontraŭeco.

Kiam estimo kaj oboe ne ekzistas kiel libervola donaco, sed aperas nur kiel surdevigitaj rimedoj por eviti torturon kaj mortpunon, ili estas nur rabbitaj realaĵoj. Kaj estas certe, ke en tia zono la paco ne povas ekzisti. Ĉi tie la vivo necese fariĝas sanga. La subpremitaj serĉas liberecon. La evoluo ne lasas sin esti diktita aŭ priskrib-

ita de terhomaj kapricoj. Ĉio tia devas rompiĝi. Ĝia vojo obeas al multe pli alta menso ol la tera. Kaj la diktaturo sekve ne estas tiu rimedo, per kiu la monda paco estas atingebla. Nur la mala principo povas savi la homaron. Sed la mala principo de devigo estas libereco. Kaj libereco estas ja la samo kiel – "donaco", ĉar ĉia donaco povas ekzisti nur kiel io, kio estas liberigita, senkonsidere sub kiu ajn formo ĝi aperas.

Kiam tiel estas pli bone doni ol preni, multaj eble opinias, ke la vojo al la savo de la mondo fakte estas subite forpreni de ĉiuj bonstataj homoj iliajn riĉaĵojn aŭ forpreni de ĉiuj homoj iliajn "privatajn posedaĵojn" por en la sekvanta momento disdoni ĉiujn valorojn de la tero absolute egale inter ĉiuj unuopaj homoj, sed tiel ne estas. Ankaŭ tia disdivido estus ja diktaturo. Ke la valoroj ekzistas kiel "privataj posedaĵoj", ke iuj homoj proprigis al si la valorojn, dum aliaj nenion havas, tio estas ja sekvo de la evoluo. La nuntempaj cirkonstancoj estas la speciala esprimmaniero de certa evoluŝtupo, kio plue signifas rekte avaraĝa sekvo de la provizora speciala mensa stato sur la skalo de amo al proksimulo, kiun reprezentas ĉiuj teraj homoj kiel tuto. Sekve tio estas la pinto de ĉio kion mense ili povas doni unu al la aliaj.

Ke en sia nuna formo tiu donado ne estas la plej primitiva, same kiel ĝi ankaŭ ne estas la plej nobla imagebla, samtempe kun tio, ke ja estas fakto, ke ĝi troviĝas en kreskado, ke la vera evoluo de la homoj survojas al pli kaj pli granda reciproka socidonado unu al aliaj, tio montras kiel fakton, ke ĝi estas problemo de evoluo, alivorte, ke ĝia ŝanĝiĝo estas analoga al kreskado de estulo de infana al plenkreska stato kaj tial ĝi ankaŭ ne povas okazi surbaze de

ordono.

Se hodiaŭ ĉiuj valoroj estus egale dividitaj inter ĉiuj homoj de la tero, ni vidus tiun strangaĵon, ke en la daŭro de tre mallonga tempo miloj kaj miloj da homoj suferus en ruinigita stato, dum aliaj estus pe-reantaj pro bonstato, pro abundo kaj ekscesa uzado. La homoj do troviĝus sur precize la sama ŝtupo kiel ĝis tiam. Fari leĝojn kun tiel drasta postulo, ke neniu rajtas posedi pli ol la aliaj, do rezultigus senrezistan kontraŭon, kiu havus la providencon mem aŭ la tutan naturon kiel kunbatalanton kaj sekve estus por la tera homo same nevenkebla kiel estas la irado de la luno aŭ la vojo de la suno.

Preni riĉaĵojn de la riĉaj kaj doni ilin al la malriĉaj nur signifus translokiĝon, sed ne forigon de la rilato. Ke la malriĉaj administrus la riĉaĵojn pli bone kaj estus pli donacemaj al tiuj riĉuloj, kiuj nun estus ricevintaj la lokon de la malriĉuloj, ol tiuj faris dum sia bonstato, tio ne estus ĝenerala regulo. Ĉu ne en la ĉiutaga vivo montriĝas precize, ke la malriĉuloj, kiuj subite ekhavas grandajn riĉaĵojn, en plej multaj okazoj tute ne nobliĝas per tio, sed ke orgojlo aŭ fieraĉo precipe realiĝas en ilia menso, eĉ ĝis tia grado, ke kelkfoje ili retiras sin el la kunesto eĉ kun siaj gepatroj, nur ĉar tiuj estas malriĉaj? – Ili hontas pro ili rilate al siaj riĉaj amikoj kaj rilatuloj. Ne, la malriĉaj ne estas pli bonaj ol la riĉaj, kaj la riĉaj ne estas pli bonaj ol la malriĉaj. La belaj domoj kaj ekstravagancoj kiuj karakterizas la riĉulojn, ne estas aferoj de reala evoluo, sed nur afero de mono, kaj ĝi estas farebla de ĉiu, kiu venas en posedon de kapitalo. La krimulo povas porti la belajn vestojn same bone kiel morale evoluinta.

Estas ĝuste, ke al uzado de luksaj do-

moj kaj belaj vestoj apartenas "kulturo" kaj "edukiteco", sed en multaj okazoj tio ne estas afero de evoluo, sed nur lernita "dresiĝo", ekstera mensa "lako" aŭ "verniso" per kiu oni malhelpas al "la proleto" en propra interno fariĝi tro malkaŝa aŭ videbla por onia "distingita" rilatularo. Tiu ĉi "dresiĝo" estas nur priskribo, kiu ĝis certa limo estas aĉetebla kaj lernebla kaj de la neevoluinta kaj de la evoluinta, se nur oni havas monon, ĉar ja ne temas pri la leviĝo de la persono de unu reala evoluŝtupo al alia, sed estas kontraŭe kaŝa masko, per kiu oni povas doni al malalta ŝtupo eksteran aspekton identan kun tiu de ŝtupo pli alta.

Esti riĉa sekve ne estas favorado fare de la providenco, same kiel la situacio esti malriĉa ne estas puno aŭ malgraco de la sama centro de potenco.

Esti riĉa aŭ malriĉa do neniel estas firmaj rekoniloj aŭ esprimoj pri tio, ke oni estas alte evoluinta. La plej granda saĝulo de la kristanismo ja esprimas sian ekonomian situacion jene: "la vulpoj havas kavojn, kaj la birdoj de la ĉielo havas nestojn, sed la filo de homo ne havas lokon, kie ripozi sian kapon", – dum aliaj saĝuloj, ekz. Salomono havis grandajn riĉaĵojn kaj Budho estis filo de reganto. –

Kiam en la realo la ago doni estas la ĉefa principo en la terhoma evoluo, estas tiu akso, ĉirkaŭ kiu ĉia ĉiutaga vivo turniĝas, do estas certa afero, ke la irado de ĉi tiu vivo fariĝas malkvieta, brua, skrapa kaj nestabila, fariĝas plena de puŝoj kaj batoj tiel longe, kiel ĉi tiu "akso" ne estas solide fundamentita, sed kunsvingiĝas en la supera centrifuga forto de la terhomaj "prenavidoj". Tio, sub kio la tera homaro hodiaŭ ĝemas kaj anhelas, do estas la ligiteco de ĝia propra estado kun la menciita nestabiligita akso. Kaj "la savo de la mondo", la

liberigo de la homaro aŭ "la mondliberigado", sekve estas stabiligo de ĉi tiu akso tiel, ke ĝi fariĝos la reale centra kaj firme reguliga ekvilibra punkto por ĉia terhoma mensa svingiĝo. Per tio ĉesos ĉiuj nun tiel bone konataj kaj teruraj malekvilibraj statoj en la menciita svingiĝo, kiujn ni nomas milito, mortigo kaj korpodifektado, ekzekutoj, rabo kaj puno kun iliaj sangelverŝo sur ĉion, kio estas nobla, paca kaj bela, amema kaj kleriga aŭ viviga, kaj daŭraj paco kaj harmonio povos neĝenitaj anstataŭi la nuntempan mortigobruon kaj fari la vivon kantado, muziko kaj kreoĝojo.

Evoluo de la donacprincipo do estas la savo de la mondo. Kaj ni ja ankaŭ vidas, ke ĉi tiu principo estas la animo de ĉia saĝo kaj laŭ speciale adaptita maniero estas la ĉefa en la nunaj grandaj mondreligioj. De ĉi tie ĝi transiras en la terhoman menson kiel bazo por moralformiĝo, donas pli kaj pli da eĥo en ĝia juro, leĝoj aŭ rajtosistemo, politiko kaj sociadministrado.

La donacprincipo estas la malo de la principo de devigo, kaj tial ĉie, kie ĝi evoluas, ĝi rezultigas pli kaj pli grandan liberecon por la socio kiel ankaŭ por la unuopaj homoj. Kiel esprimo de tio ni vidas tra la historio, kiamaniere la aŭtokrataj aŭ diktatoraj monarkioj pli kaj pli devis ŝanĝiĝi al demokratioj, liberŝtatoj aŭ respublikoj.

Dum la unuopa homo sub la unue menciita regoformo estis absolute senpotenca subulo de aŭtokrata reganto super ĝiaj vivo kaj morto, super ĝiaj materia pozicio kaj apero, atingis ĝi sub la laste menciita sistemo antaŭen al tio esti kundecida unuo en la gvidado de la socio mem. Ĝi estas ricevinta la tiel nomatan voĉdonan rajton. Ĝi partoprenas elekton aŭ decidon pri la personoj, al kiuj doniĝas la regopotenco, kaj pri tiuj leĝoj kaj reguloj, kiujn ili

proponas. La aŭtokratio sekve estas estinta aĵo, mensa muzeaĵo.

Ke tamen en kelkaj landoj oni devis en la formo de diktaturo meti tian muzeaĵon sur la tronon, tio ja ŝuldiĝas nur al tro dominantaj plimulto de animoj sur la evoluŝtupo de la subuloj de la estinteco, estuloj, kiuj ne laŭ sufiĉa grado fintravivis la efikojn de la diktatoraj neperfektaĵoj, ne spertis, ke neniam en la longa daŭro nelimigita potenco de unuopa homo super animoj sur tre diversaj evoluŝtupoj povas konduki al harmonio escepte en okazo de tio, ke la diktatoro aŭ la potencohavanto havas nelimigitan komprenon pri ĉiuj mensaj nuancoj sur ĉiu unuopa ŝtupo de tiu evoluskalo, sur kiu liaj subuloj necese troviĝu je ĉia tempo. Sed por ricevi tian komprenon la diktatoro devus esti tre alte anime aŭ spirite incita. Sed ĉar ĉi tiu iniciĝo estas atingebla nur tra la totala evoluo de la amo al proksimulo en propra interno, kio necese sekvigas: kompletan fintraviviĝon kaj degenerintan potencavidon, tiu fintraviviĝo plue neeviteble sekvigas la avidon pri, kaj la ĝojon pro kreado de libereco por ĉiuj, kaj tial oni komprenas, ke tiel alte incita estulo ne povas esti diktatoro. Sed, kiam incita estulo ne povas esti diktatoro, tiun ĉi oficon ĉiam devas okupi – neinicita, kio plue signifas estulon, kiu ne povas havi perfektan mensan sperton pri ĉiuj tiuj animaj okazaĵoj en la apero de tiuj subuloj, super kiuj li kaptis por si mem rajton senlime ordoni aŭ regi. Li ĵonglas kaj ordonas fortojn, kiujn li ne konas ĝisfunde, kaj kies leĝojn li sekve ankaŭ ne povas sekvi. La rezulto de ĉi tio necese fariĝas hazardeca devigo super ĉi tiuj fortoj. Ĉar ĉi tiuj fortoj estas la menso de la subuloj, lia agmaniero sekve signifas subpremadon. Subpremadon de menso kreas ĉe la subpremito avidon aŭ

sopiron pri libereco, sopiron pri forigo de la jugo, ĉar ĝi estas haltigo de la kresko de lia vivo, estas meti la evoluon en frenezuljakon.

Sed ĉar en la longa daŭro neniu kiraso estas sufiĉe forta por esti materialo por solida "frenezuljako" de la evoluo aŭ por en la longa daŭro haltigi la iradon de la vivo, tial ĉia kiraso aperanta en formo de diktaturo neeviteble finfine krevas meze en sia ŝajna glora potencemego. Por la vivo ne ekzistas ia baro.

Estas ĝuste, ke ankaŭ la demokratio reprezentas uzadon de potenco, kiu kelkfoje de multaj sentiĝas kiel devigo kaj subpremado. Sed ĉi tie tiu subpremado neniel povas fariĝi tiel domina kaj supera kiel la suverena diktaturo, en kiu ĉia kritiko, rezisto aŭ kontesto povas kaŭzi al sia praktikanto mortpunon kaj sekve laŭ plej alta grado estas vivdanĝera.

Sub la demokratio ĉia sociaranĝo, ĉiu leĝo, estas rezulto de reprezentantoj de ĉiuj interesosferoj. Se aranĝo fariĝas tro ĝena aŭ nenecesa, la avido pri ĝia abolo ja iom post iom kreas tiun voĉan plimulton, kiu povas forigi ĝin. Estas certa afero, ke ĉe tia regoformo, kie ĉiuj pere de sia voĉdona rajto havas eblon igi sian komprenon valida, havas rajton esti kundecida por aŭ kontraŭ realigo de aranĝo, misuzo de la ŝtata potenco ne povas laŭ tiu grado realiĝi kiel tra diktaturo, kie la potenco senlime estas donita al unuopa estulo, kaj kie sekve ĉiu unuopa el la ceteraj civitanoj de la ŝtato estas komplete senigita je ĉia formo de influo aŭ kundecida rajto ĉe la ŝtata formo. Tial fariĝas ankaŭ fakto, ke neniel ĉi tio povas fariĝi io alia ol esprimo de la kapricoj kaj ambicioj de la diktatoro aŭ potencohavanto, de lia naiveco kiel ankaŭ de lia inteligento, de liaj malbonaj kiel ankaŭ de

liaj bonaj ecoj. Unuopa erara impulso fare de li facile kondukas popolon en abismon. Tial la diktaturo neniam en la longa daŭro povas fariĝi tiu barilo kontraŭ pere kaj humiligo, kiel estas la demokratio, kie ĉiu granda decida registara impulso ne havas iun ajn influon aŭ forton, antaŭ ol ĝi estas rezulto de la apogo de la plimulto de la kundecidanta popolo. Kaj antaŭ ol ĝi atingas tian stadion, ĝi necese estas rezulto de la pripensoj por kaj kontraŭ fare de ĉi tiu plimulto, kaj sekve pli altgrade kun garantio estas esprimo de trankvila pripensado kaj konsiderado, ol kiam ĝi estas esprimo de subita decido de la diktatoro, kiu ne devas trapasi la konfrontiĝon kun la scioj aŭ konsideradoj de aliaj.

Ĉi tie oni eble kontestas dirante, ke la regoformo de la demokratio estas tro malrapida, kaj ke tio, ke ĉiuj havas kundecidan rajton, kreas nur politikan diskutegon, per kio ĉiuj decidoj malfruiĝas aŭ prokrastiĝas. Sed ĉu kulturita popolo devas tiel urĝi, ke ĝi ne havas tempon igi siajn decidojn trairi plej eble grandan pripensadon aŭ konsideradon, sed blinde devas lasi tion al unuopa el siaj milionoj da cerboj? – Kaj ĉu tia urĝeco povas esti esprimo de kulturo? – Kaj ĉu popolo aŭ socio povas kreski laŭ kulturo kaj spirito ligante siajn milionojn da cerboj al anticipe komandita aŭ ordonita unudirektita pensado? – Ĉu ne per tio ĝi sufokas sian intelekton? – Ĉu ne estas fakto, ke tiuj organoj, kiuj ne estas uzataj, degeneras kaj pereas? – Se neniam oni uzus pli ol unu el siaj dek fingroj, la aliaj naŭ ja neeviteble velkus, fariĝus neuzablaj aŭ mortus. Se oni neniam parolas, oni ja perdas la parolkapablon. Ĉu oni ne kredas ankaŭ, ke finfine oni perdus la vidokapablon, se oni estus devigita dum jaroj vivi en komplete mallumo? – Jes, la vivo ne toler-

as ion superfluan. Ĉio neuzata mortos. Kaj ĉu ne tiu rapideco, kiun la diktaturo povas elmontri en siaj registaraj aferoj estas multekosta, kiam ĝi povas okazi nur surbaze de aranĝo, kiu metas ĝiajn milionojn da cerboj kaj per tio la ĉefan parton de sia intelekto en frenezuljakon? – Ĉu popolo povos kreski kulture malpliigante aŭ reduktante sian pensokapablon? – Ĉu tio ne estas same malsaĝa, kiel estas aserti, ke viro kuras supren laŭ ŝtuparo samtempe kun tio, ke li kuras malsupren laŭ ĝi? – Ĉar la vojo al evoluo de ĉia intelekto kaj kulturo iras tra libereco pensi, libereco kritiki, kio signifas montri mankojn aŭ erarojn, libereco prezenti ideojn kaj imagojn, kiuj ne estas precize ene de la aprobita horizonto aŭ fariĝis oficialaj moro kaj kutimo, kaj estas ankaŭ absoluta libereco per sia voĉdona rajto libere kaj malkaŝe esti por aŭ kontraŭ ĉiu intencita propono en la ŝtata gvidado aŭ la sociaranĝo, tial neniu ajn diktaturo iam ajn povos fariĝi identa kun vera kulturŝtato, ĉar ĝi ja ekzistas nur surbaze de malliberigado aŭ malgrandigado de libereco por tiu intelekto, kiu estas la absolute malhavebla vivonervo, impulso aŭ la neskiebla fundamento por ĉia reale civilizita kulturo.

Ke la diktaturo havas grandan evoluigitan teknikon, grandajn fabrikojn, ne estas esprimo de vera kulturo, tio estas esprimo nur pri io lernebla, estas nur rezultoj de preskriboj. Ĉi tiuj rezultoj povas fariĝi esprimo de kulturo aŭ vera civilizo nur tra tio, por kio ili estas aplikataj. Se la elstara tekniko, se la grandaj fabrikoj precipe estas aplikataj en kreado de mortigiloj, rafinitaj eksplodiloj, kaj pafiloj, bombavidoj kaj submaraj ŝipoj, venengasoj ktp., do ili estas esprimo nur pri tio, ke iliaj uzantoj estas nur – "naturhomoj", kiuj vestiĝis

per "modernaj vestoj". Do estas "la boŝmano" aŭ "la fajrolandano", kiu ricevis modernajn armilojn. Do estas la konkeremaj sovaĝaj triboj de la estinteco, kiuj hodiaŭ kaŝiĝas en la militistaraj procesioj kaj paradoj. Kaj en tia okazo oni pli bone komprenas, ke ili devas havi diktatorojn. Ankoraŭ la tribestrokultado ne estas fintravivita en ilia konscio same kiel ĝi ja ankaŭ estas nemalhavebla en ĉia milita manifestaĵo. Ĉi tie oni bezonas diktatorojn. Sur batalejo oni ne povas debati pri la batalplano. Tio donus al la malamiko avantaĝon. Ĉi tie la soldato devas blinde obei la generalon. Ĉi tie gravas rapideco. Ĉi tie la vivĝojo estas surprizata kaj kompleta rompo de la kontraŭulo, la malamiko. Sed, ĉu popolo estas konsiderebla kiel kultura popolo aŭ kiel vere civilizita, nur ĉar ĝi transprenis al sia propra regoformo la vivoformon kaj militodisciplinon de tiuj sovaĝaj popoltriboj? – Mi povas vidi nur tion, ke en la realo tia nacio fariĝas nur – "kaserne", en kiu svarmas superecaj "generaloj" aŭ potencplenaj helpistoj de la diktatoro, kaj subpremitaj dresitaj sklavoĵoj en formo de nenion dirantaj "senranguloj". Ĉar tiel la diktaturo povas ekzisti nur surbaze de forpreno de la libereco de la regantoj. Ne estas nature por la vivaj estuloj libervole lasi sin anime aŭ materie ligiĝi. Kaj tial la diktaturo devas la tutan tempon esti en batalo kontraŭ tiu naturo, kiu ne estas nur cerba kontraŭeco, sed kontraŭe estas la kreskado de la vivo mem en la menso de la regantoj. Kaj ĉi tiu kreskado ne estas haltigebla, sed nepre kiel antaŭe menciite finfine rompos la frenezuljakon de la diktaturo.

La diktaturo do estas batalo kontraŭ la vivo kaj la evoluo mem kaj sekve estas la plej granda kontrasto al la donacprincipo.

Estas la reĝimo de la potenco, kiu havas hejmlokon nur en zonoj, kie "Valhalo", kvankam ne konscie, ankoraŭ estas la ĉioampleksa, brila aŭ glorinda idealo kompare kun kiu ĉio alia en la vivo devas paliĝi, zonoj, en kiuj "la rajto" estas ankoraŭ nebula nocio. Laŭ sama grado, kiel la estuloj ankoraŭ troviĝas sur ĉi tiuj evoluŝtupoj, kie la "potenco" kaj ne "la rajto" estas la absolute gvidanta idealo, ili do povas laŭdegi la diktaturon. Sed se en la evoluo ili atingis antaŭen al zonoj, kie "la rajto" komencis havi lokon antaŭ "la potenco", tiam ruiniĝas la moralo de la glavo, kaj la ĝermoj de nova mondo, en kiu la rajto kaj sekve la libereco por la kreskado de ĉia pli alta vivo komencas vidiĝi en la foro. Ĉar tiu ĉi nova mondo estas mondo de la libereco, ĝi estas mondo de la donacprincipo, ĉar neniu ajn formo de donaco povas ekzisti sen tio, ke ĝi estas esprimo de iu aŭ alia liberiĝo. Ĉiu ajn donaco sekve identas kun la ago "liberigi". La unua iom videbla rezulto de la influo de tia atmosfero de libereco al la terhoma socio ligita de la bestaj tradicioj de potenco, estas tio, kion hodiaŭ ni nomas "demokratio". Kaj estas memkomprenebla afero, ke en sia nuna formo ĉi tiu demokratio tute ne reprezentas tiun formon, kiu estas la fina celo de la evoluo por demokratio. Praktike dirite la demokratio troviĝas laŭ kosma vidpunkto ĝuste nur en sia komenciĝo. Ĝi devas batali kontraŭ la ankoraŭ fortaj diktatoraj inklinoj de la individuoj kaj en kaj ekster ĉia nuntempa regiono de potenco. Same kiel la bestaj tradicioj ne estas ŝanĝeblaj per subita liberiĝo ili ne estas ŝanĝeblaj per subita devigo. La vera liberiĝo de la estulo estas ebla nur pere de ĝia propra evoluo. La vera anima libereco sekve estas io, kio venas kun la kresko same kiel faras ŝanĝiĝo de la

estulo de infano al plenkreskulo. Tiu ŝanĝiĝo ne estas diktebla aŭ elsorĉebla per eksperimentoj aŭ ordonoj.

Sed la demokratio havas tiun avantaĝon kompare kun la diktaturo, ke ĝi lasas la vivon adaptiĝi al la evoluo pro tiu voĉdona rajto aŭ kundecida rajto, kiun ĝi garantias al ĉiu unuopa el siaj civitanoj. Laŭ tio, ke ili ŝanĝas vidpunkton, ricevas pli da kompreno kaj talentaro, ĉi tio ja ŝanĝas la voĉdonan intereson de ĉi tiuj estuloj. Kaj pro ilia voĉdona rajto ili do havas kundecidan influon avantaĝe al konformigo de la objekto de la voĉdonado kun la ŝanĝita intereso. Laŭ ĉi tiu maniero la demokratio fariĝas regoformo, kiu la tutan tempon sensange ŝanĝiĝas en kontakto kun la kreskantaj mensaj ŝanĝiĝoj kaj postuloj, kiujn je ĉiu tempo la evoluo sekvigas.

Ĉar la diktaturo neniel povas doni al siaj civitanoj ĉi tiun liberecon aŭ decidan rajton ne ĉesante esti diktaturo, ĝi sekve neniam povas veni en kontakto kun la evoluo ĝis pli longe ol tiuj evoluŝtupoj kie la anima vivo ankoraŭ havas tiel malgrandan amplekson, ke ĝi ne sentas sin premita aŭ malhelpita de la unuecigo de la diktaturo.

Ni nun tuŝis la donacprincipon aŭ la principon de liberigado kaj vidis, ke ĝi estas la labormetodo de la naturo mem, kaj ke tie, kie la homoj kontraŭas ĉi tiun principon, estiĝas la devigo aŭ la kontraŭeco. Tie estiĝas la malliberigo, kies rektaj postefikoj povas ekzisti absolute nur kiel "kribliĝo" aŭ "misformiĝo". Tra nia traktado de diktaturo kaj demokratio ni vidis iom de tiu ĉi vero. Ni vidis, ke la diktaturo estas aferaĵo, en kiu la mensaj vivofortoj, kio estas la miloj da cerboj de la popoloj, estas preskaŭ malfunkciigitaj, tiel ke nur unuopa eta cerba kapablo (tiu de la diktatoro) havas eblon disvolvi sin en la granda korpo de

la nacio, pro kio laŭ kultura vidpunkto tiu ĉi necese finfine devas velki aŭ ruiniĝi, kvankam eble komence ĝi povas ŝajne brili laŭ potenco kaj konkerado. Ni vidis ankaŭ, ke la demokratio estas korpo en plena sano kaj spirita aktiveco, ĉar ĉiuj ĝiaj cerbaj centroj povas disvolviĝi kaj tra la kundenca rajto de ĝia posedanto pli aŭ malpli povas esprimiĝi en la socia vivo, kiu tiel ĉi fariĝas oceano de novaj ideoj, novaj manifestadoj aŭ moviĝoj supren en spirito kaj kulturo. Ni do vidas, ke tiel la donacprincipo aŭ la principo de la liberigado faras la demokration unu kun la vivo, dum la principo de devigo faras la diktaturon identa kun la morto.

Sed, kiam la principo de liberigo havas tiel ĉiodominan efikon al la amaso, ja ne estas mirige, ke la plej grandaj gvidantoj, profetoj kaj saĝuloj, religifondintoj aŭ mondliberigantoj de la homaro senĉese tra religioj, libroj kaj konduto esprimas, ke la absolute plej grava realaĵo estas: la amo. La amo estas ja donacprincipo aŭ principo de liberigo en pura formo. "La amo ne serĉas sian propran", kio signifas, ke amo estas mensa sinteno, kies pensodirekto estigas ĝojon en zorgado de la bonfarto de aliaj antaŭ sia propra. Ĝi estas konduto, kiu tra "donado de si mem por aliaj" povas krei nur la plej altan feliĉosenton, alivorte la perfektan centprocentan donacadon de si mem al la vivo aŭ la ĉirkaŭaĵoj, la perfektan centprocentan liberigadon por la evoluo kaj travivado de la vivo por ĉiuj aliaj vivaj estuloj.

Sed kiuj en la tera homaro atingis ĝis tie? – Ĉi tie la respondo necese estas tre negativa. La menciita socio troviĝas ja ĝuste sur ŝtupo, kie preskaŭ neniu estas tiom evoluinta, ke ili povas fariĝi objekto de tiel ĉion superbrila kosma donaco, ke

ĉiuj aliaj homoj donas sin por la koncernulo, pro kio ankaŭ preskaŭ ne troviĝas iuj, kiuj estas tiel evoluintaj, ke ili kapablas doni ĉi tiun donacon aŭ laŭ tiel supera grado povas doni sin mem por aliaj. Sed post momento ni traktos la problemon pli detale, tiel ke ĉiu unuopa interesito mem povas vidi, kiom li aŭ ŝi estas en kontakto kun la amo aŭ ĉi tiu plej granda principo de la vivo, kaj per tio konstati sian realan spiritan pozicion en sia kurso al la plej alta feliĉo. Ke iom post iom la donacprincipo fariĝas faktoro, kiun oni ne povas eviti en la moderna socio, tio ne povas esti nekonata al multaj. Ni ja vivas en tempo, kie la sociaj cirkonstancoj estas tiaj, ke iĝis tre kutime, eĉ preskaŭ abunde ordinare, ke "doniĝas" kaj "riceviĝas" "donacoj". Troviĝas filantropiaj entreprenoj, troviĝas sociala helpo, okazas mondkolektoj tra la preĝejoj kolektuoj, kolektiĝas por misiistaj laboroj, doniĝas al kristnaska manĝigado de malriĉuloj kaj por feriaj restadoj de malriĉaj infanoj. Grandaj kaj riĉaj firmaoj kaj riĉaj personoj fordonacas kapitalojn al publikaj aranĝoj, al arto, scienco kaj ekspedicioj ktp. – Ni ne devas pli detale trakti ĉi tiujn formojn de donacado, nur aludi, ke ja estas nekontestebla, ke ili estas nerefutebla pruvo pri penetro en la terhoman organismon de nova kaj pli bona mondo. Estas la granda vivprincipo de la naturo mem "prefere doni ol preni", kiu tiel publike kaj private komencas trarompi la baran principon "prefere preni ol doni" de la besta egoismo.

Kvankam ĉi tiu laste menciita principo ja ĝis geniece estas tiel bone organizita tra la negoca kaj reklama sistemo, ke ĝi regas la ekonomion de la granda amaso, igas la malriĉajn ŝparosumetojn de milionoj flui en grandaj fluoj en ĝiajn bankojn kaj moninstitutojn aŭ financajn entreprenojn kaj

tie amasiĝi laŭ miliardovaloroj, la granda donacprincipo de la naturo mem devigas en formo de la antaŭe menciitaj sociaj donacformoj ĉi tiujn valorojn reflui al la socio.

Kvankam kiel menciite ĉi tiu redonado de valoroj kompreneble por la tera socio ankoraŭ estas nur en sia delikata komenciĝa aŭ feta stato, tamen sufiĉas, por ke ankaŭ ĉi tie oni povu ekvidi la grandan bazan principon de la naturo mem: la ciklon. Same kiel la oceano ne povas reteni la akvoamason alfluintan al ĝi de la kontinentoj tra riveroj kaj riveretoj, sed devas en formo de pluvo, nebulo kaj matena roso redoni ĝin al la tero, tiel ankaŭ la monaj oceanoj ne povas en la longa daŭro reteni la valoramasojn alfluintajn tra la riveretoj kaj riveroj de la komercado kaj reklamo, sed devas en formo de la antaŭe menciitaj publikaj kaj privataj formoj de donacado komenci redoni ilin al la socio.

Koncerne la konon pri nia propra harmonio kun la naturo kaj nia pozicio en la menciita ciklo, tio ĉi ankaŭ apartenas al "la sola bezonata". Konstati ĉi tiun pozicion povas okazi nur per detala analizo de tio, kiel en la realo oni donas sian donacon. Troviĝas multege da formoj de transigo de valoroj de unu homo al alia, kiuj oficiale havas la nomon "donacado", sed en la realo troviĝas absolute nur unu sola maniero, laŭ kiu valortransigo de unu homo al alia estas absoluta donaco laŭ kosma vidpunkto. Ĉi tiu maniero manifestiĝas nur, kiam la donaco identas kun absolute centprocenta liberigo de transigo de valoro de la donacanto al la ricevanto. Se troviĝas nur la plej eta atendo pri rekompenco laŭ ia maniero, tiam la transigo en la realo estas nur maskita komerco. Tiam "la donaco" estas ja nur vendovaro, pro kiu la atendita re-

kompenco estas "pago". Kaj ĉu ne estas precize la foresto de ĉi tiu atendita "pago", kiu kreas tiom da malamikeco kaj amaro inter la estuloj? – Ĉu oni ne ofte aŭdas homojn amare diri ion similan al: "Nun mi faris tiom kaj tiom por li (ŝi), mi helpis lin al tio aŭ tio, donis al li tiom da servoj, kaj tamen li konsideras min nenio. Li bone povas atenti la aliajn, sed mi ĉiam estas flankenŝovita"? – Sed kio estas tio, kion ni vidas ĉi tie? – Ĉu ne ĝuste tio, ke la donoj de la koncernulo ne estis centprocenta liberigo, sed havis sekretajn klaŭsojn? Ĉu la kolero ne estas malkaŝo de atendita "pago" en formo de agrabla rekompenco? – Kaj ĉu la sama kolero ne ŝuldiĝas ĝuste al la foresto de ĉi tiu "pago"? –

Se malkaŝe la doninto prezentis al la donacricevinto, ke la dono okazis nur kondiĉe de la atendita rekompenco, kaj la donacricevanto akceptis ricevi la donacon laŭ ĉi tiu speciala maniero, do ja temus pri pura kaj vera komerco. En tia okazo la amaro de la doninto pro la foresto de la rekompenco estus do pli ĝuste motivigita. Sed, ĉar la donaco estis donita sen iaj ajn malkaŝe prezentitaj klaŭzoj aŭ kondiĉoj kaj sekve rilate al la donacricevinto estis maskita kiel "donaco", tial tiu "donaco" estis ja fraŭdo al la donacricevinto. Sekve ne estas ĉi tiu, kiu estas "la pekulo", sed la donacinto mem. En la koncerna okazo li neniel estas prava en la sento de malesperigo aŭ amaro al la donacricevinto, kiu ja nenion ajn promesis kaj sekve ne ricevis la donacon sub iuj ajn antaŭkondiĉoj kaj eble neniam akceptus ĝin, se li konus la sekretajn klaŭzojn.

Se donaco povas rezultigi eĉ la plej etan penton aŭ amaron ĉe la doninto, do tio estas absolute senerara signo aŭ pruvo pri tio, ke "la donaco" absolute ne estis "dona-

co", sed sekreta "antaŭpago" por iu aŭ alia atendita bonaĵo.

La vera absoluta donaco estas sankta kaj neniam ajn povas sekvigi ion alian ol ĝojon por sia doninto, ĉar laŭ kosma vidpunkto ĝi povas esti nur realiĝo de kulminanta amo, alivorte centprocenta sento de feliĉo ekskluzive per la donado. La amo havas neniun ajn ligan al postulo, ĝi ne "serĉas sian propran". Tial la perfekta donacanto neniam ajn montras amarecon, malinklinon aŭ malamikecon al tiuj, kiujn li (ŝi) apogis aŭ al kiuj donis donacojn, ĉar li ja neniam atendis eĉ la plej etan personan avantaĝon aŭ favoradon pro tio. Kiam li ne havis ĉi tiun atendon, li ja ne povas senti sin seniluziigita, eĉ ne en la plej malfavoraj okazoj, kie la donacricevinto tute ne montras dankemon aŭ bonvolon al li, sed kontraŭe, kiel kelkfoje okazas, fariĝas postulema. La perfekta donacanto havas sufiĉe da feliĉo pro la konscio esti farinta ion veran bonan. Lia feliĉo ne estas rekompenso por la bono, kiun li faris, sed kontraŭe la perfekta sento de tiu beateco, kiu neeviteble sekvas ĉiun altruisman agon aŭ manifestmanieron, kiu vibras centprocente en kontakto kun la impulso de la vivo mem aŭ kun la plej altaj portantaj fortoj en la universo, tute sendepende de tio, kiom da materia gajno aŭ malgajno la koncerna ago eble havis sur ceteraj kampoj. Por la honesta aŭ vera donacanto do ne estas iu ajn atendo pri rekompenso, kiu estas la portanta aŭ realiga faktoro, sed kontraŭe estas la sento de la ago en la konscio kiel plej alta dia travivado. Kaj tiel la menciita estulo ricevas en tiu dia ago mem riĉan rekompenson.

Por la primitiva aŭ falsa donacanto kontraŭe estas la sekreta gajno aŭ rekompenso, kiu estas la motiviga faktoro. Kaj

tial oni bone komprenas la malesperiĝon kaj amaron de tiu estulo, kiam ĉi tiu tute forestas.

Sed la menciita amaro ja montras kiel fakton, ke li tute ne estas donacanto, sed ke por li la donacprincipo kontraŭe estas nur konscia aŭ nekonscia metodo en atingo de kontentiĝo de egoismaj avidoj. Sed ĉar tia metodo ja estas misformado aŭ maskado de la faktaj cirkonstancoj kaj sekve speco de kaptilo por la donacanto, ĝi estas trompo. Kaj ĉiu donaco, kiu pli aŭ malpli estas realigita aŭ donita sub tia formo, povas aparteni nur al la submondo de la civilizo, ĝi tiel malhelpas al ĉiu ajn, kiu estas ĝia praktikanto, esti vera kulturhomo. Tia estulo ankoraŭ estas spirita proleto.

Tiu maniero, laŭ kiu homo donas sian donacon, do fariĝas la mezuro aŭ rekonilo por tio, kiom longe antaŭe ĝi troviĝas en vera kulturo aŭ spirito. Se estulo kapablas doni donacon sen bazo de plej eta postulo pri rekompenso, sed kontraŭe donas ĝin kun centprocenta liberigo por la ricevanto, kio signifas donas ĝin kun sekreta sankta devigo de si mem neniam pro la donaco senti plej etan grajnon de amaro aŭ indigno kontraŭ la donacricevanto, tute senkonsidere, kiel ajn li agos al oni en la estonteco, senkonsidere, ĉu laŭ ĉiuj manieroj li neglektas onin avantaĝe al favorado de aliaj personoj, kun kiuj li ŝatis havi rilaton aŭ sentis emon doni sian simpation aŭ bonvolon, tiam onia donado estas vera donaco, senkonsidere kio ajn estis la donacobjekto senkonsidere ĉu estis pure korpa aŭ mensa laborforto, aŭ ĉu estis materiaj objektoj, havaĵo aŭ oro. Tiam oni vere atingis ŝtupon, kie la amo kaj ne la egoismo estas la plej alta instiga faktoro en onia konscio. Tiam la donaco jam pagis sin mem en formo de la dia sento de kontakto kun la

vivo kaj sekve la sento esti "unu kun la Patro".

Samgrade, kiel donaco devias de tiaj antaŭkondiĉoj, laŭ sama grado ĝi estas falsaĵo kaj ne povas esti esprimo de vera kulturo kaj sekve nerefuteble identas kun unu el tiuj multaj realaĵoj, kiuj ankoraŭ retenas la homojn en primitiveco kaj humiliĝo, persekuto kaj suferoj.

Fari ĉi tiun redonadon aŭ ĉi tiun ciklon perfekta, tiel ke ĉiuj zonoj ricevos la necesan ekonomian malsekecon, someran pluvon kaj matenan roson, per kio la financa dezerta stato, la malriĉeco, povu fariĝi problemo de estinteco, tio estas la misio de la demokratio. Kaj tiel tiu ĉi misio estas malfermado de tiu pordego de libereco, kiu estas ekskluzive la sola, tra kiu racia kaj praktika mondliberigado povas veni en kulminon sur la teraj kontinentoj.


Ĉapitro 8

La reala donaco

Sed tra la larmoj de la malsukcesoj romp-

iĝas la egoismo, kaj la perdita filo rekondukiĝas al la kurso de la vivo, lernas donaci laŭ la ĝusta maniero, venas en kontakto kun la universo, paŝas en la vicon kiel rimedo de dio por la plej granda kaj plej perfekta donacado: la ĉionpardona eterna amo. Kaj per tio fariĝas realo: "pli beate estas doni ol preni". *Ĉar nur en ĉiu perfekta altruisma donacado al sia proksimulo aperas la radi-aŭreolo de la eterna patro. Nur ĉi tie sentiĝas lia rekta proksimeco. Kaj neniu venas al li pli proksimen ol tiu, kiu havas tiun grandan amon, ke li riskas sian vivon por savi siajn kunestulojn. Tio estas, de la vivo, la plej granda malkaŝo de la principo doni. Tio estas la modelo de la perfekta konduto. Nur tra la kulmino de amo, vera donaco povas naskiĝi. Kaj nur tra la reciproka donado de tia donaco de la individuoj unu al la alia, daŭra paco kaj perfekta harmonio povas fariĝi lumanta kaj malkaŝi "la homon laŭ la bildo de Dio".*

El la dana originalo "Gavekultur",
1-a eldono 1953, tradukis Ib Schleicher



Piron nun en la spirita mondo

Hokan Lundberg

Kiel vi verŝajne jam scias Claude Piron la 22an de januaro 2008 subite forlasis la fizikan mondon. Piron signifis multege por mi. Liaj mesaĝoj, artikoloj kaj libroj donis/as kaj grandan inspiron kaj ĝuon! Antaŭ 10 jaroj mi sendis mian unuan mesaĝon al li kaj apenaŭ povis kredi kiam li respondis. Ke li, elstara kaj fama Esperantisto, trovis tempon respondi al simpla Esperanto-komencinto, tio tre surprizis min. Poste sekvis relative intensa korespondado kiu rezultis en la intervjuartikolo "Interesaj respondoj".

(<http://claudepiron.free.fr/articlesenesperanto/respondoj.htm>)

Jen kelkaj mallongaj eltiroj de tiu intervjuo:

HL: ... ĉu vi mem renkontis gardanĝelon?

CP: Mi havas bonan rilaton kun mia gardanĝelo. (Mi uzas singularon, kvankam ŝajnas, ke pluraj estaĵoj – eble eĉ multaj – ludas tiun rolon). Mi ne scias, ĉu la vorto "renkontis" taŭgas. Mi perceptis ĝian agadon.

HL: Kion vi pensas pri karmo kiel la pedagogio de Dio?

CP: Mi kredas je karmo kiel dia pedagogio, sed mi konstatis, ke la karmokoncepto tre ofte estas miskomprenata kaj misuzata.

HL: Ĉu vi ankaŭ kredas je reenkarniĝo?

CP: Jes, mi kredas je reenkarniĝo. Fakte granda parto de mia vivo estis direktita de la fakto, ke, kiel infano, mi havis memorojn pri antaŭa vivo, sed neniu kredis min.

Tial mia rilato al la vero estis vere suferiga.

HL: Ŝajnas al mi ke viaj sperto kaj kredo vere kongruas kun la Kosmologio de Martinus.

CP: Ĉu vi interesiĝas pri la verkaro de Martinus?

Mi scias pri la ekzisto de la verkaro de Martinus, sed ne vere pri ĝia enhavo. Mi interesiĝus pri ĝi, se mi disponus pli da tempo, kaj mi ne mirus, se ĝi tre kongruus kun miaj kredo kaj sperto.

* * *

En junio 2007 Piron skribis la jenon en retpoŝtmesaĝo leginte artikolon de Martinus:

"Finfine mi trovis tempon legi "Tra la pordo de la morto". Tiu teksto tute kongruas kun miaj spertoj kaj ideoj (krom pri tio, ke ĝi asimilas ĉion spiritan al elektro; mi povas akcepti tion se mi rigardas ĝin metaforo). Mi neniam pensis antaŭe pri malsamaj situacioj laŭ la aĝo, sed ili estas tute normalaj, nur povas esti tiaj, fakte.

... malofte mi legas tekstojn, kiuj tiel perfekte akordas kun mia maniero koncepti la homan ekzistadon."

* * *

Mi supozas ke Piron nun havas tre agrablan tempon en la spirita mondo kaj deziras ĉion bonan al li estontece! Kaj, se mi konas lin ĝuste, li certe daŭrigas sian gravan laboron helpi al homoj kaj al Esperanto.

Novajoj

Esperanto-semajno en Martinus-Centro

Ĉi-jare inter 2-a kaj 9-a aŭgusto la esperanto-semajno en Klint okazos samtempe kaj paralele kun dana, sveda, angla kaj germana kursoj en internacia etoso. Ĉiun antaŭtagmezon estos interpretata prelego kaj studrondo, posttagmeze estos konversacia rondo kaj je la 18-a horo estos prelego de Ole Therkelsen. Tiuj vesperaj prelegoj estos aŭdeblaj por ĉiuj gastoj en Martinus-Centro, kaj tial ili espreble ankaŭ funkcios kiel informo kaj verbaĵo por la internacia lingvo – esperanto.

La kurso en esperanto pri la Kosmologio de Martinus en la sekva jaro okazos en Klint inter 01.08 - 08.08 2009.

/Ole Therkelsen



Martins-Kosmologio priparolita en rusa libro

En 2007 ruso kaj esperantisto Anatolij I. Ivasenko, kiu loĝas en Krasnodar en la montaro Kaŭkasus, skribis ruslingvan libron kun la titolo "Esotera instruoj por komencantoj" (ISBN 978-5-222-11647-0). Eldonejo "Feniks" en Rostov ĉe rivero Don eldonis la libron en kvanto de 3000 ekz. Leciono n-ro 12, el en tute 20 lecionoj, pritraktas la kosmologion de Martinus.

/Ole Therkelsen

Portugallingva paĝo pri kosmologio en la reto

Kaj Jensen en brazila urbo Fortaleza faris retpaĝon ĉe la adreso: www.martinusonline.net. – Brazila Darcy Werneck, kiu tradukis du librojn en la portugalan, ankaŭ tradukis tekstojn por la retpaĝo. /Ole Therkelsen



Unua kroata preleganto

Davorin Gruden, kiu estas konata pro sia partopreno en pluraj kursoj en Klint, fariĝis la unua kroata preleganto, kiam li la 17.11.2007 en marborda urbo Opatija kroatlingve prelegis pri "Martinus-Kosmologio – scienco pri la vivo". Poste sekvis du prelegoj en libra foiro "Ezoterika Croatika" en la ĉefurbo Zagrebo. Inter alie li prezentis 9 kroatlingvajn librojn pri la kosmologio, ĉiuj aĉeteblaj ĉe eldonejo TELEDISK, Potocnjakova 4, HR-10000 Zagrebo, Kroatio, teledisk@zg.t-com.hr, www.teledisk.hr. /Ole Therkelsen



LA KOSMOLOGIO DE MARTINUS

Martinus estis dana verkisto (1890-1981).

La kosmologio de Martinus estas spirita scienco. Ĝi priskribas la eternajn principojn, leĝojn kaj bazajn energiojn, kiuj fundamentas la spiritan kaj fizikan mondojn. Laŭ kosma konscio ĉio estas viva, eĉ de la atomo en mikrokosmo, de plantoj, bestoj kaj homoj en mezkosmo al galaksisistemoj en makrokosmo. La universo estas unueca organismo, viva estulo.

La mondo ĉiam evoluas. Por kompreni la evoluon de besto al homo oni bezonas la pensojn pri reenkarriĝo, sorto kaj karmo. La homaro nun spertas suferojn kaj malmumon. Iom post iom tio kaŭzas en ĉiu homo evoluon al logika pensmaniero, al pli humana sinteno kaj homama kapablo. Tio estas la provizora celo de la evoluo.

La plej gravan instruadon donas al ni la vivo mem. Ni ĉiuj estas naturaj membroj de tiu lernejo. Tial la kosmologio de Martinus ne havas iajn ajn membrecon, unuiĝon aŭ asocion. Sed ĝi celas doni al la unuopa homo komprenon pri la eternaj vivleĝoj, kaj helpi al ĉiu interesato fariĝi memstara kaj kapabla mem vivi homame, logike kaj tolereme.

Pro komenciĝanta amkapablo la homaro iam forlasos la bestoregnon kaj la mortigan principon kaj kreas internacian, pacan mondregnon.

Studado de la kosmologio donas al vi helan kaj optimisman vivkomprenon.

MARTINUS-INSTITUTO

en Kopenhago, Danio, eldonas la librojn de Martinus kaj informas pri lia kosmologio.

MARTINUS-CENTRO

en Klint, Danio, estas studejo por la kosmologio. Okazas ankaŭ instruado en Esperanto.

KOSMOS

ELDONANTO

Martinus-Instituto
Mariendalsvej 96
DK-2000 Kopenhago
Tel. (+45) 38 34 62 80
Fakso (+45) 38 34 61 80
Telefon- Lundo-ĵaŭdo 13-16
tempo: Vendredo: 9-12
DK p. ĝiro ...642-9580
UEA-kodo ...mins-d
www.martinus.dk
info@martinus.dk

REDAKCIO

Helen Claesson,
Ole Therkelsen
(respondeca)
Jonas Dahlmosé

Kompostado:
Ove Koldso

ABONO

Jaro: 2 ekzempleroj
Prezo en EU
DKK 64,00 aŭ EUR 8,60
Prezo ekster EU
DKK 51,20, EUR 6,90
aŭ USD 10,00
Unuopaj kajeroj
DKK 32
Se vi ne povas pagi per
fremda valuto, demandu
la Instituton.

KOPIRAJTO

©Martinus Idealfonduso
Reuzo de teksto kaj bildoj
nur laŭ skriba permeso.